


DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

✧ dumonata kristana revuo en esperanto ✧ N-ro 6 (831) 2001 ✧

Kaj la lumo brilas en la
mallumo, kaj la mallumo ĝin
ne venkis (Joh 1:5)



Vaclav LAMR

1 TIMOTEO

LA FRANCA REFORMITA ORDO DE DISERVO

LA TENTO

INDEKSO 2001

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala,
kunlaboranta kun UEA

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la
Evangelion pri Jesuo Kristo.

Prezidanto: Jacques TUINDER

✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerck
☎ +31 251 231941; ✉ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen
a/d Rijn, Nederlando; ☎ +31 1724 20222;
✉ j.a.van.dijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn,
Germanio; ☎ +49 7131 162688;
✉ silkrueger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto,
minimume €20,- ☎ Membro-subtenanto €30,-
☎ Nura abono: pagante rekte al KELI €16,-
☎ pagante al Libroservo €18,- Sendoj de
okcidentaj monbiletoj per registrita letero al
la kasisto de KELI ☎ Se estas en via lando
UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu
prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI
☎ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340
Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@altern.com.

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas
nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko
permesataj, kondiĉe, ke oni citas la fonton.
Specimenon kun represo aŭ traduko oni
sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo **hejme** Kazimierz LEJA
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
☎ +48 32 763 37 13; ✉ k.leja@inetia.pl

ENHAVTABELO

123 Al Timoteo 1

Denove nova traduko de Gerrit
BERVELING

127 Tendo

Biblia komento de David BUDDEN

129 La Franca Reformita Ordo de Diservo

Klarigoj de Philippe COUSSON

132 Moderna fabelo

Rakonto pri mediprotekto kaj
produktado, raportita de Jacques
TUINDER

REDAKTORAJ VORTOJ

Karaj gefratoj en Kristo

Ni alvenas al fino de la unua jaro de la jar-
cento, de la dua jaro de la nova formato de
Dia Regno, kaj baldaŭ al Kristnasko.

Ni vivas en mondo daŭre militanta. Mi ne
volas paroli pri la praveco de milito. Pri tio
malsamopinias la kristanoj. Mi povas simple
beadŭri la vivojn prenitajn, la konstruaĵojn
detruitajn, la malamon estigitan aŭ plifort-
tigitan, ktp.

Ĉiun duan monaton, mi devas pretigi nu-
meron, foje facile, foje malpli facile, foje mi
havas tempon, foje mi streĉiĝas. Por mia ri-
pozo, estus bone havi tekstojn, ilustraĵojn.
Eĉ pli ripoze por mi estus havi ilin en elek-
tronika formo.

Kristnasko estas la mesaĝo de la savo al
mondo, veninta en formo de infano, kaj
manifestiĝinta en formo de krucumito relev-
iĝinta. La mesaĝo de la savo estas la mesaĝo
de la senpaga savo, de le nemeritebla savo,
nemeritebla sed ofertita. Neniu kapablas
per si mem havigi al si la savon. Kaj tiu, kiu
provas tion atingi, iluzias sin mem. La ho-
mo estas pravigita de Dio, sen kontraŭpago.
Ni devas vivi el tio, kaj anonci tion ĉirkaŭ
ni. Tio devas esti nia mesaĝo por la nuna
jarcento. Tiun mesaĝon devas ankaŭ peri
nia revuo.

Bonajn festotagojn!

Philippe COUSSON

AL TIMOTEO 1 {PRIVATE}

nova traduko de Gerrit Berveling

1:1 Paŭlo, apostolo de Mesio Jesuo
laŭ taskigo fare de Dio, nia Savanto, kaj
de Mesio Jesuo, nia espero, 2 al sia ama-
ta infano en la fido Timoteo: gracon,
kompatemon kaj pacon de Dio la Patro
kaj de Mesio Jesuo, nia Sinjoro.

3 Kiel forirante al Macedonio mi pe-
tis vin resti en Efezo, por ke vi ordonu
al certaj homoj, ke ili ne plu devie in-
struu kaj 4 ne plu okupiĝu pri mitoj kaj
senfinaj genealogioj, kio ja kondukas
al diskutoj pli ol kontribuas al la eko-
nomio de Dio en la fido...¹ 5 La celo de
tiu ordono estas la amo, kiu <fontas> el
pura koro, el bona konscienco kaj sin-
cera fido. 6 Kelkaj deviiis de tio kaj trafis
en sensencan babiladon. 7 Ili volas esti
instruistoj de la Torao², sed ili ne kom-
prenas kion ili diras aŭ kion tiel firme ili
asertas. 8 Ni scias, ke la Torao estas mi-
rinda, sed oni traktu ĝin ĝustamaniere³
9 kaj oni ja konsciu ke la Torao ne es-
tas por la justulo, sed por senleĝuloj kaj
senrespektuloj, por malpiuloj kaj pe-
kuloj, por fiuloj kaj primokantoj de ĉio
sankta, por patro- aŭ patrinmortigintoj,
por murdistoj, 10 malĉastuloj, perfortaj
pederastoj, homrabistoj, mensoguloj,
jurperfidantoj, kaj kio krome kontraŭas
la sanan instruon, 11 kiu laŭas la gloran
bonan mesaĝon de l' beata Dio, kiun oni
konfidis al mi.

12 Mi dankas lin, kiu fortigis min: Me-
sion Jesuon nian Sinjoron, ĉar li konfi-
dis je mi, prenante min en sian servon⁴,
13 kvankam antaŭe mi estis blasfemu-
lo, persekutanto kaj trokuraĝulo. Sed
kompatemon mi spertis, ĉar — ankoraŭ
senfida — mi agis en nescio. 14 La graco

de nia Sinjoro superŝutis min, kaj kune
kun tio la fido kaj la amo <kiuj estas>
en Mesio Jesuo. 15 Ĉi parolo estas fidin-
da kaj meritas plenan jesadon: Mesio
Jesuo venis en la mondon por savi pe-
kulojn. Kaj la unua elinter tiuj estas mi.
16 Ĝuste tial mi spertis kompatemon:
Mesio Jesuo volis montri sian tutan in-
dulgemon unue al mi, kiel ekzemplon
por ĉiuj kiuj estonte fidos je li, pro la
vivo eterna. 17 Al la reĝo de la eonoj,
al la nepereema, nevidebla unika Dio
estu la honoro kaj la gloro por la tuta
eterneco. Amen.

18 Ĉi taskon mi konfidas al vi, Timo-
teo, mia infano, laŭ la profetaĵoj kiuj
antaŭe estis eldiritaj super vi. Kun ties
apogo, vi batalu por la bona afero, armi-
ta per fido kaj bona konscienco. Ĉar kel-
kaj delasis de ĉi tio, ilia fido ŝiprompiĝis.
20 Al tiuj apartenas Himeneo kaj Alek-
sandro, kiujn al Satano mi transdonis,
por ke ili mallernu blasfemi.

2:1 Tutunue mi petas ke oni plenumu
preĝojn, petegadon, porpetojn kaj dan-
kodiroyjn por ĉiuj homoj, 2 por imperie-
stroj⁵ kaj por ĉiuj altranguloj, por ke pie
kaj inde ni povu vivi sen ajnaj pertur-
boj kaj kviete. 3 Tio estas bona kaj plaĉa
antaŭ Dio nia savanto, 4 kiu deziras, ke
ĉiuj homoj saviĝas kaj atingas la scion
pri la vero. 5 Ĉar Dio estas unu; ankaŭ
estas unu peranto inter Dio kaj la ho-
moj, la homo Mesio Jesuo. 6 Tiu sin do-
nis kiel elaĉeton por ĉiuj; je la fiksita
tempo li donis ateston. 7 Kaj pri tio mi
estis farita heroldo kaj apostolo — la ve-
ron mi diras, mi ne mensogas —, por
instrui la gojojn pri la vera fido.

8 Mi do deziras, ke ĉie la viroj preĝu kun levitaj manoj, pie kaj sen malamo aŭ kverelo. 9 Mi ankaŭ deziras ke ĉe tio la virinoj estu dece vestitaj kaj ke ili sin ornamu en prudenta modesto, ne per artoplenaj hararangoj, oro, perloj aŭ multekostaj vestaĵoj, 10 sed per bonaj faroj, kiel decas la virinojn, kiuj volas esti Di-dediĉitaj. 11 La virinoj en ĉiu kvieto aŭskultu la instruon kaj sciuj sian lokon. 12 Mi ne permesas al ili mem instrui aŭ lecionoj al viroj; ili <aŭskultu> kviete. 13 Ĉar unue Adam estis kreita kaj <nur> poste Eva. 14 Kaj ne Adam estis delogita, sed la virino sin lasis forlogiĝi kaj per tio ekkulpis. 15 Sed ŝi saviĝos per sia patrineco⁶, se ŝi estos firma en fido, amo kaj sankta sinregado.

3:1 Jen parolo fidinda: „Se iu strebas al la episkopeco, tiu deziras mirindan taskon”. 2 La episkopo estu neriproĉinda, edzo de unu virino⁷, sobra, prudenta, pripensema, gastema, kapabla instrui, 3 ne sklaviĝinta al la vino, ne kolerigema, sed akordiĝema, ne kverelema, ne monavida, 4 scianta bone regi sian propran familion kaj inde aŭtoritata pri siaj infanoj. 5 Se iu ne scias gvidi la propran familion, kiel li povus prizorgi la komunumon de Dio? 6 Li ne estu ĵus konvertiĝinta, por ke li ne fariĝu fiera kaj ke ne trafu lin la <sama> verdikto kiel la diablon. 7 Ankaŭ ĉe la eksteruloj li havu bonan renomon; alie li kompromitiĝos kaj eble lin rete kaptos la diablo.

8 Ankaŭ la diakonoj estu honestaj homoj, ne perfidaj, ne sklaviĝintaj al la vino aŭ gajnavidaj, 9 konsciencopuraj kaj fidelaj al la sekreto de la fido. 10 Ankaŭ ilin unue oni ekzameni; poste, se ne estas plendokialoj, ili plenumu sian oficon.

11 Ankaŭ la inaj <diakonoj>⁸ estu indaj, ne klaĉemaj, sobraj kaj ĉiurilate

fidindaj.

12 Diakonoj estu edzo de unu virino kaj bone gvidu siajn infanojn kaj sian hejmon. 13 Kiuj bone plenumas la diakonecon, akiros al si altan pozicion kaj la rajton paroli libere pri la fido je Mesio Jesuo.

14 Tion ĉi mi skribas en la espero baldaŭ veni al vi. 15 Sed se mi estos malhelpata, tiam vi jam scias kiel oni kondukta en la domo de Dio, t.e. la eklezio de la vivanta Dio, kolono kaj fundamento de la vero. 16 Kaj granda sendube estas la mistero de nia religio:

Li malkaŝiĝis en la karno,
justigita en la Spirito,
aperis al la anĝeloj,
heroldiĝis inter la gojoj,
estis fidata en la mondo,
kaj supren levita en gloro.

4:1 Emfaze diras la Spirito, ke en la fina tempo kelkaj defalos de la fido, ĉar ili obeos la erarigajn spiritojn kaj demonajn instruojn, 2 sub influo de perfidaj mensoguloj, kiujn brulstampas ilia propra konscienco. 3 Ili malakceptas la nupton kaj la uzadon de difinitaj manĝaĵoj, kvankam Dio kreis tiujn por sub dankodiro esti uzataj de la fiduloj, kiuj rekonis la veron. 4 Ĉar ĉio kion kreis Dio, estas bona, kaj nenio malprobinda, kion dankeme oni akceptas: 5 ĝin sanktigas la parolo de Dio kaj la preĝo.

6 Se ĉi tion vi diros al la gefratoj, vi estos bona diakono⁹ de Mesio Jesuo, formita de la principoj de la fido kaj de la bona instruo, kiun fidele vi sekvas. 7 Ne okupiĝu pri senenhavaj malseriozaĵoj. Ekzerciĝu en religia vivado. 8 La korpa ekzercado ja malmulte valoras, sed religia vivado ĉiurilate estas valora, ĉar ĝi entenas promesojn kaj por la nuna vivo kaj por la venonta. 9 Tiu ĉi diro estas

fidinda kaj meritas plenan aprobon. 10 Tio ĉi ja estas la celo de ĉiu nia klopodado kaj luktado, ĉar ni metis nian fidon je la vivanta Dio, kiu estas savanto por ĉiuj homoj, precipe por la fiduloj. 11 Ĉi tion vi instru al ili kaj pri tio ĉi vi lernigu ilin. 12 Neniu malrespektu vin pro via junaĝo, sed vi estu ekzemplo por la fiduloj, parole kaj age, en amo, en fido kaj en pureco. 13 Atendante mian alvenon, vi dediĉu vin al la voĉlegado <de la Skriboj>, la admonado kaj la instruado. 14 Ne neglektu la gracodonon, kiu estas en vi kaj kiun pro profeta diro vi ricevis sub komuna surmetado de la manoj fare de ĉiuj pliaĝuloj. 15 Prenu ĉi tion al la koro, restu ĉe ĉi tio; tiam viaj progresoj estos videblaj por ĉiuj. 16 Daŭre zorgu pri vi mem kaj pri via instruigo; tion ne delasu. Tion farante vi savos kaj vin mem kaj kiuj aŭskultos vin.

5:1 Kontraŭ viro pli aĝa vi ne parokleksplodu, sed konsilu al li kvazaŭ <li estus> via patro. Junajn virojn vi instigu kvazaŭ fratojn, 2 maljunajn virinojn kvazaŭ patrinojn, junajn virinojn kvazaŭ fratinojn, en ĉia pureco.

3 La vidvinojn, kiuj vere estas vidvinoj, vi tenu en honoro. 4 Sed se vidvino havas infanojn aŭ genepojn, tiam unuavice tiuj devas lerni sin dediĉi al siaj propraj parencoj kaj rekompenci al la gepatroj¹⁰, ĉar tio estas plaĉa en la okuloj de Dio.

5 La vera vidvino, kiu postrestis tute sola, esperas je Dio, kaj tage kaj nokte ŝi preĝas kaj petegas; 6 sed se ŝi vivas en riĉo kaj lukso, ŝi — viva — estas mortinta. 7 Ankaŭ ĉi tion emfaze vi instru al ili, por ke ili kondukta neriproĉeble. 8 Kiu ne zorgas pri siaj propraj parencoj kaj eĉ ne pri sia samdomanaro, tiu malkonfesis la fidon kaj estas pli terura ol nefidulo. 9 <Kiel> vidvino enskribiĝu

<virino> ne pli juna ol sesdek jarojn, edzino de unu viro. 10 Ŝi estu atestata pri siaj bonaj faroj: ke infanojn ŝi edukis¹¹, ke ŝi montris gastemon, ke ŝi lavis la piedojn al sanktuloj, ke ŝi subtenis homojn en premateco, ke unuvorte ŝi sin dediĉis al ĉiaspecaj bonaj faroj. 11 Pli junajn vidvinojn vi ne akceptu, ĉar se ilia pasio forlogos ilin de <la servado al> Mesio, ili denove volas edziniĝi, 12 kaj tiam ili ricevos la riproĉon, ke sian antaŭan fidelon ili rompintis. 13 Krome ili kutimiĝas vizitadi domojn, kie ili havas nenion por fari; kaj ne nur tio: senĉese ili babiladas, sin miksas en ĉion ajn, kaj parolas pri kio ne decas. 14 Tial mi deziras, ke la pli junaj <vidvinoj> reedziniĝu, ekhavu infanojn, mastrumu sian hejmon, kaj ne donu al la kontraŭuloj eblon kalumnii nin. 15 Ĉar kelkaj jam deviis kaj eksekvis Satanon. 16 Se fidulino havas vidvinojn <inter la parencaro>, ŝi subtenu tiujn, por ke ili ne ŝarĝu la eklezion; ĉar tiu subtenu la verajn vidvinojn.

17 La pliaĝuloj, kiuj montriĝis bonaj gvidantoj, meritas duoblan honoron, precipe se ili laboris pri la parolo¹² kaj la instruado. 18 La Skribo ja diras: La draŝantan bovon vi ne buŝumu, kaj la laboristo meritas sian pagon. 19 Ne akceptu kulpigon kontraŭ pliaĝulo, krom laŭ la diro de du aŭ tri atestantoj. 20 Kiuj miskondutas, tiujn vi publike riproĉu, por timigi la ceterajn. 21 Mi prenas ateste Dion kaj Mesion Jesuon kaj ties elektitajn anĝelojn: senantaŭjuĝe vi plenumu ĉi ordonojn, kaj nenion vi faru pro partiemeco. 22 Al neniu tro haste vi surmetu la manojn, kaj vi ne faru vin kunkulpaj pri pekoj aliulaj; tenu vin puraj.

23 Ne trinku plu nur akvon, sed uzu ankaŭ iom da vino, por via stomako kaj

pro viaj multaj malsanetoj. 24 De kelkaj homoj la pekaj tiom diskoniĝis, ke ili antaŭiras <ilin> al la juĝo; ĉe aliaj ili postsekvos. 25 Same diskoniĝas la bonaj faroj, kaj alie ili ja ne povos resti kaŝitaj.

6:1 Kiuj portas la sklavo-jugon, tiuj ĉiel respektu siajn sinjorojn, por ke ne blasfemiĝu la nomo de Dio kaj nia doktrino. 2 Kiuj havas fidulojn kiel sinjorojn, tiuj ne malŝatu ilin, ĉar ili estas iliaj fratoj. Male, des pli fidele ili servu al ili, ĉar kiuj profitas de ilia servado, ja estas fiduloj amataj. Tiel vi instruu kaj admonu.

3 Se iu instruas devian doktrinon kaj ne sin tenas je la sanaj principoj de nia Sinjoro Jesuo Mesio kaj je la doktrino de nia religio, 4 tio estas homo fera, kvankam nenion li scias, sed malsaneco li interesiĝas pri ĝenaj demandoj kaj vortbataloj. Ties rezulto estas envio, malpaco, kalumnioj, suspektemo 5 kaj senfinaj diskutoj inter homoj mense konfuzitaj, senigitaj je la vero, kiuj konsideras la religion fonto de enspezoj. 6 Nu, sendube la religio donas grandan profiton al kiuj kontentas pri kion ili havas. 7 Ĉar en ĉi mondon nenion ni kunportis, kaj nenion ni povas forporti el ĝi. 8 Sed se manĝaĵojn kaj vestaĵojn ni havas, ni estu kontentaj pri tio. 9 Kiuj deziras riĉigi sin, tiuj falas en tenton kaj implikiĝas en ĉiaspekaj riskaj kaj danĝeraj deziroj, kiuj malfeliĉigas kaj pereigas la homon. 10 Ĉar la radiko de ĉiu malbono estas la monavido. Cedante al ĝi kelkaj jam deviis de la fido kaj sin suferigis per senfinaj torturoj.

11 Sed vi, homo de Dio, tion vi fuĝu! Strebu al justeco, pieco, fido, amo, persistemo, mildeco. 12 Batalu por la bono de la fido, kaptu la eternan vivon, por kiu vi estas vokita, kaj pri kiu vi fa-

ris la bonan ateston antaŭ multaj atestantoj.

13 Mi avertas vin antaŭ Dio, kiu ĉion vivigas, kaj antaŭ Mesio Jesuo, kiu faris la bonan ateston antaŭ Poncio Pilato: 14 plenumu plene kaj firme ĉi ordonon ĝis la apero de nia Sinjoro Jesuo Mesio, 15 kiun je la destinita tempo montros al ni Dio, la feliĉa, la sola estro, la Reĝo de l' reĝoj kaj la Sinjoro de l' sinjoroj. 16 Nur Li posedas senmortecon. Li loĝas en nealirebla lumo. Neniu homo Lin vidis nek kapablas vidi Lin. Al Li estu la gloro kaj eterna potenco! Amen.

17 La riĉulojn de ĉi mondo vi emfaze avertu, ke ili ne estu trokuraĝaj kaj ne metu sian esperon je riĉeco, kiu ja necertas, sed je Dio, kiu abunde ĝuigas nin pri ĉio. 18 Diru al ili, ke ili bonfaru, ke ili estu riĉaj en bonaj agoj, malavaraj kaj mildaj. 19 Tiel ili faras al si bonan investadon por la estonto, por fine akiri la veran vivon.

20 Timoteo, gardu, kio estis konfidata al vi, kaj forturnu vin de la senenhava kaj malplena rezonado kaj de la subtilaĵoj de la t.n. gnostiko.¹³ Kelkaj el ĝiaj predikantoj jam vojperdiĝis disde la fido.

La graco estu kun vi ĉiuj.

- 1 Laŭlitere: la ekonomio, t.e. pli malpli „la hejmrulado” de Dio, en la fido. Fakte, la frazkonstruo kiu komenciĝas per Kiel forirante al... ŝajne interrompiĝis.
- 2 Tipe Juda esprimo, kvankam en N.T. la termino nur renkontiĝas en Lk 5: 17 kaj Ag 5: 34.
- 3 Alia traduko: se oni traktas ĝin... ktp.
- 4 Laŭlitere: en sian diakonecon. Vidu la enkondukon.
- 5 Plurale; ja ne temas nur pri specifika imperiestro, sed kiu ajn, tute ĝenerale.
- 6 Laŭlitere: per sia infanaskado.
- 7 Tiu ĉi postulo edzo de unu virino aŭ — paralele — edzino de unu viro validas por ĉiuj ekleziaj oficoj menciataj en la t.n. pastoralaj leteroj: 1 Tm 3:2 kaj Tit 1:6 la episkopo, 1 Tm 3:12 la diakono, kaj 1 Tm 5:9 la vidvino. Imageblas pluraj interpretoj de ĉi esprimo. Unuavide oni povas vidi ĉi tie malpermeson pri poligamio; sed tiam la postulo edzino de unu viro estus malpermeso pri poliandrio, kio

TENTO

„Tento” estas grava vorto en la Biblio kaj en Genezo ĉapitro 3 ni lernas, kiel Adamo kaj Eva alfrontis tenton kaj kiel ili reagis. Estas lecionoj por ni el ilia sperto.

Unue, ni agnosku la fortecon de la provo. La afero ne temas pri nura fruk-

tiukulture kaj tiutempe estus senseca, ĉar la mondo mediteranea nek pagane nek en judismo konis poliandron. Nura indiko pri geedza fidele certe estus malsame vortigita. Do ŝajne povus temi nur pri malpermeso de dua nupto; tiam do ĉiuj homoj vivantaj en dua geedzeco estus neelekteleblaj por la ekleziaj oficoj, senkonsidere ĉu temas pri dua nupto post la morto de l'unua partnero aŭ ĉu post divorco. La oficon de vidvino oni eble povis konsideri kiel iaspecan fianĉinecon kun Mesio, do la postulo (5:9) ke la vidvinoj super 60 jaroj rezignu pri reedziniĝo estas komprenebla; sed aliflanke ne estus komprenebla kial vidvo per reedziniĝo perdis la taŭgecon esti episkopo aŭ diakono, des pli ĉar la pli junajn vidvinojn ege emfaze oni petas reedziniĝi (5:14). Re-nupto do ne en si mem estis konsiderata malbona. Restas la klarigo, ke por tiuj, kiuj deziras eklezian oficon, en ĉi komunumo ekzistis malpermeso pri divorco plus re-nupto dum la unua partnero ankoraŭ vivas. En la imperiestra periodo ĝenerale ege kreskis la nombro de l' divorcoj. Vidu ankaŭ Mk 10:11; Mt 5:32; 19:9; Lk 16:18a; 1 Kr 7:10s. Laŭ ĉi letero do minimume la homoj strebantaj al ekleziaj oficoj sekvu ĉi tiun regulon.

8 Alia ebla traduko: la edzinoj de diakonoj. Sed en la fruaj eklezioj inaj diakonoj ja estis konata fenomeno; vidu ekzemple Rom. 16:1.

9 Ĉi tie, ŝajne, en pli ĝenerala senco: servanto.

10 Subkomprenu: la bonon kiun de tiuj ili ricevis.

11 La teksto ne diras, ke siajn infanojn ŝi edukis, kaj ĉar ĉi tie temas pri serio de t.n. bazaj kristanaj virttoj, ja bone povas temi pri edukado de orfoj. Ĉe la t.n. bonaj faroj en N.T. oni klare distingis inter almozoj kaj bonaj faroj; vidu Mt 6:1-4 kaj Mt 5:14-16. Kiel bonaj faroj menciigas: nutri malsatantojn kaj soifantojn — Mt 25:35; 10:42; esti gastema — Mt 25:35; 10:40s; Rm 12:13 ktp; vesti bezonulojn — Mt 25:36; Ag 9:39; Jk 2:15s; viziti malsanulojn, kaptitojn kaj soleciĝintojn — Mt 25:36; Jk 1:27; eduki orfojn — Mk 9:37; eble ankaŭ ĉi tie; entombigi mortintojn — Mk 14:8.)

12 Ni dirus: predikado.

13 La baza signifo de tiu vorto estas: scio. Efektive la Gnostika movado estis unu el la plej gravaj rivaloj de la frua ortodoksa kristanismo.


to, ĉu manĝi al; ĉu ne manĝi; la frukto havis apartan nomon, „La arbo de sciado pri bono aŭ malbono”; „sciado” — jen la grava vorto. Homoj ĉiam serĉas „scion”; ili sendas raketojn explore al malproksimaj planedoj; ili penas krei vivaĵojn; ili ŝanĝas plantojn per genetica ingenierarto ktp., mallonge dirite, la homaro volas havi povon super naturo. Senĉese li volas havi „scion”. Multaj junuloj englutas drogojn serĉantaj „sperton” preter kutimaj spertoj. Antaŭ Adamo kaj Eva estis tiu arbo kun ĝia aparta nomo.

Eble Adamo kaj Eva reziztis tenton longtempe; pri tio, la Biblio silentas. Sed finfine Eva alproksimiĝis al la arbo; ŝi rigardis la arbon; ŝi meditis pri la nomo de la arbo; kian signifon havis la nomo, „la arbo de sciado...”? kia „sciado”? Mense, do, ŝin tuŝis la tento. La ruza serpento kaptis la ŝancon, „Ĉu Dio diris, ke vi ne manĝu...?” Eble antaŭ la okuloj de Eva, la serpento manĝis; Dio ne malpermesis al li. Eva ripetis la vortojn de Dio, ke se ili manĝos, ribele kontraŭ Li, ili mortos. „Ne, vi ne mortos”, flustris la serpento. Jen la unua mensogo en la Biblio — kaj multaj ankoraŭ fidas al tiu mensogo; morto ne estas la salajro de peko sed alvoko al pli alta servo aŭ transiro al pli bona vivo. Eva, do, rigardis la frukton pli scivole; la frukto estas bona por manĝi kaj estas ĉarma al la okuloj (sed kelkaj ĉarmaj fruktoj enhavas venenon, ĉu ne?); la frukto estas dezirinda por saĝiĝi. Paŝon post paŝo, do, Eva glitis en tenton. Preninte la frukton ŝi donis al Adam kaj

kune ili ribelis kontraŭ Dio. Pripensu la punkton; Eva ne malkaŝe spitis Dion, ŝin mense tuŝis la tento, ŝi restis proksima al la arbo, ŝi aŭskultis la ruzajn vortojn de la serpento kaj glitis iom post iom en tenton; finfine ŝi falis.

Jozef elportis tenton de la edzino de Potifar sed li firme rifuzis aŭskulti ŝin. „Jen, mia sinjoro kontrolas ĉe mi nenion en la domo, ... neni en ĉi tiu domo estas pli granda ol mi, kaj li retenis de mi nenion, krom vi, ĉar vi estas lia edzino. Kiel do mi faros ĉi tiun grandan malbonagon kaj pekos antaŭ Dio?” (Genezo 39:7-12). Jen la sinteno de Jozef

(1) Tia ago estus trompo de la fido de Potifar al mi, kaj (2) eĉ pli grave, tia ago estus peko antaŭ Dio, Jozef, do, rifuzis mense esti tuŝita de la tento, li firme forrifuzis ĝin, li rifuzis aŭskulti la virinon kaj li rifuzis esti kun ŝi. Jen la bonega ekzemplo de virtulo.



En La Sentencoj de Salomono, 7:6-23, oni legas pri naivulo kiu falis en tenton. Li sciis pri la publikulino sed anstataŭ foriri de la fidomo li mense ludis per la tento; (1) li pasis sur la placo preter ŝia angulo, (2) li iris la vojon al ŝia domo, (3) en krepusko, (4) kiam fariĝis nokto kaj mallumo. Paŝon post paŝo, do, la senprudenta junulo glitis en tenton. Li falis antaŭ la glataj, ruzaj vortoj de la tentantino „...kiel bovo iras al la buĉo”.

Ankaŭ Jesuo elportis tenton. Li malsatis, grave malsatis sed lia Patro jam donis al li la povon de la Sankta Spirito, do, ĉe unu vorto, li povis havigi al si panon, mirakle en la dezerto. Sed Jesuo sciis, ke lia Patro donis tiun povon por ebligi al li prediki la evangelion kaj

montri la aŭtoritaton de Dio per miraklaj agoj. Uzi tiun povon por kontentigi siajn proprajn bezonojn estus misuzo de la Dia povo „Estas skribite” reagis Jesuo al la tento kaj li citis sian Bibliion por fortigi sian decidon resti fidela al sia Patro. Trafis Jesuon en la menso, ke li povos allogi la homamasojn kaj gajni ilian adoron. Li memoris la promeson ke anĝeloj gardos lin. Tuj li rekonis la tenton kiel misuzon de la promeso kaj ankoraŭfoje li reagis, „Estas skribite...”. Fine en la dezerto Jesuo pripensis la regnojn de la mondo. Li naskiĝis reĝo, ĉu ne? Ĉu li povas fariĝi reĝo de la mondo

nun sen la doloro de Golgota? Sed Jesuo sciis, ke antaŭ ol li povos regi la mondon li devas regi la homan naturon. Denove, do, li tuj reagis per „Estas skribite”. Ĉiam, do, kiam Jesuo elportis tenton, li memoris la Vorton de Dio kaj povis tuj citi taŭgan citaĵon por venki

la tenton. Jen la bonega ekzemplo por ni.

Kompreneble, ni estas senfortaj kaj nia scio pri la Vorto de Dio ne egalas tiun de Jesuo. De tempo al tempo diversmaniere ni falas en tenton — eble la tento klaĉi pri aliaj, aŭ la tento dorloti nin anstataŭ labori por nia Sinjoro, aŭ la tento preni tion, kio ne apartenas al ni, aŭ la tento pri drinkado aŭ fiagado; la eblaj tentoj estas senfinaj kaj senliniaj. Sed la bona reago, ĉiam, estas firma forrifuzo kaj Bibliaj vortoj por fortigi nian volon meti niajn piedojn en la postesignojn de Jesuo.

David BUDDEN
februaro 2000

LA REFORMITA ORDO DE DISERVO EN FRANCIO

Ĝeneralaj rimarkoj

La difino de la vera Eklezio laŭ Jean CALVIN (Kalvino) tekstas proksimume tiel: La vera Eklezio troviĝas tie, kie estas ĝuste predikata la Evangelio kaj kie estas prave celebrataj la sakramentoj. Aferoj, kiuj ĉiuj rilatas al la Diservo en la loka kadro.

Inter la protestanta diverseco troviĝas multaj manieroj Diservi. Oni ĝenerale distingas, sed tio estas simpliga, inter du kategorioj: la protestantoj kun liturgio kaj la protestantoj sen liturgio, tio estas tiuj kiuj akceptas liberajn parolojn de la ĉeestantoj, kaj tiuj kiuj per pli fiksjaj formoj lasas la parolon nur al kelkaj, eĉ foje al unu persono.

En la franca kazo, lando kun romkatolika plimulto, la liturgiaj formoj estas kutime vole distingitaj de la katolikaj. Ekzemple, estis malfacile antaŭ kelkaj jaroj uzi en liturgiaj tekstoj respondojn de la aŭdantaro. Tio pli oftas, ĉar pro ekumenismo, la rigardo al la «papistoj» ŝanĝiĝis.

La Franca Reformita Eklezio estas «liturgia protestanta eklezio». La rolo de la liturgio, de la liturgiaj tekstoj kaj kantoj estas rememorigo de la esencaj veroj. Per ili ĉiudimanĉe en la reformitaj komunumoj oni anoncas la Evangelion de la graco de Dio, de la senkosta savo.

Jen do la tradicia sinsekvo de la Diservo: Akcepto kaj preĝo, laŭdo, leĝo, pekkonfeso, anonco de pardono, kredkonfeso. Poste venas la legado de la Biblio kaj la prediko. Poste venas la celebrado de la Sankta Manĝo, ne ĉiam. Estas

ankaŭ la finaj sendo kaj beno. Ne ĉiam en la sama tempo troviĝas ankaŭ la lokaj informoj, la monkolokto, la preĝo por la aliaj.

Ankaŭ ĝenerale post ĉiu legata parto, respondas kanto de la aŭdantaro.

Laŭ la diversaj tempoj

Akcepto:

Al la Diservo, nek la eklezio, nek la celebranto invitas. Dio mem invitas, kunvokas la kredantojn. Ni respondas al Lia invito. Krome, ni ne invitas Dion partopreni nian ceremonion. Neni, per iu ajn ago, oni povas devigi Dion fari ion.

Por responde kanti la saluton al Dio, oni kutime staras.

Laŭdo

Tiam venas laŭdo al Dio. Temas ĝenerale pri teksto kiu prikantas la agadon de Dio en la naturo, sed ankaŭ pri la savo. Tion oni aŭskultas starante. Poste oni kantas, plej ofte psalmon el la ĝeneva psalmaro. Ekzistas eĉ kelkaj reformitaj eklezioj, en aliaj partoj de la mondo, kiuj kantas nur tiujn psalmojn, kaj nenion alian.

Rememorigo pri la savo

Mi indikos la signifon de la klasika ordo kaj ankaŭ de la pozicio de la kredantoj dum la sekva parto de la Diservo. Post la laŭdo, la homoj sidas. La celebranto rememorigas la ordonojn de Dio. Sidante, la homoj kantas la sanktecon de Dio. Kaj la celebranto poste

preĝas, ne por sed kun la aŭdantoj, por diri al Dio, ke tiuj ĉi ĵus aŭditajn postulojn ili ne sukcesis plenumi. Tiun saman penton ĉiuj kantas same sidante. Post tio, la celebranto anoncas ke malgraŭ tio, la graco de Dio superas, ke Li donas la pardonon pro Jesuo Kristo, sen postulo plia. La kredantoj tiam stariĝas kaj kantas laŭde la gracon de Dio per dankkanto. Ili ne staras dum la anonco, ĉar ili ne «ricevas» la pardonon pere de la celebranto. Tiu simple anoncis al ili la gracon de Dio.

Tiam ĉiuj starante diras sian fidon per la kredkonfeso. La teksto povas esti la klasika simbolo de la apostoloj (kompreneble sen la vorto «katolika», anstataŭita de «universala»), aŭ iu pli moderna teksto. La sekva kanto estas ofte triunua himno.

Legado kaj prediko

Tio estas la ĉefa parto de la reformita Diservo. Ĝi estas la nepra parto. Diservo sen prediko ne estas «vera» Diservo (oni kromnomas ĝin tiam «liturgia Diservo»), kiam Diservo sen Sankta Manĝo restas vera Diservo.

Antaŭ ol legi, oni preĝas al la Spirito por la predikonto kaj la aŭskultantoj.

Kutime la elektitaj tekstoj por bazo de la prediko estas tiuj de la komuna listo (t.e. ekumena), kun la escepto de la deŭterokanonaj tekstoj. Ĉiuj legaĵoj estas anoncitaj, kun indiko de la loko en la Biblio, por ke ĉeestantoj povu sekvi sur la propra biblio. La aŭskultantaro restas sidanta dum la tuta legado. Nenio speciala kiam temas pri la evangelioj. La tuta Biblio estas aŭdata kiel Parolo de Dio.

La prediko rilatas plej ofte rekte al unu el la Bibliaj tekstoj, ne necese tamen ofte al la evangelia teksto. Tre mal-

ofte la prediko ne ligiĝas al la Biblio. Temas fakte pri komento de la teksto, kun praktikaj kaj edifaj konkludoj.

Sankta Manĝo

Pri la kompreno de la Sankta Manĝo, troviĝas inter protestantoj almenaŭ tri ĉefaj interpretoj.

La luterana, kiu agnoskas la plensignifon de «tio estas mia korpo». La luteranoj diras ke la pano estas kaj pano kaj korpo de Kristo, kiel Kristo estas samtempe homa kaj dia.

La tradicia kalvinana, kiu asertas, ke ĝi estas nur signo, ke neniu ago povas devigi Dion fari ion, ke ni ne havas potencon super Dio. La homoj bezonas signojn, kaj Dio indikis kelkajn el ili, bapto kaj Sankta Manĝo, por enkorpiĝi la fidon. Ne temas pri magia ago, ne temas pri simpla ilustraĵo.

La radikala, kiu asertas ke la Sankta Manĝo estas simple rememorigo pri Kristo, pri lia morto kaj releviĝo.

Diskutata punkto inter la diversaj reformitaj komunumoj estas la ofteco de la Sankta Manĝo. Tiu ofteco povas vari de 2-3 fojojn jare al ĉiusemajna.

Ĉar la gesto havas en si mem nenium efikon materian, ĉar la celebranto havas nenion pli ol iu ajn alia kredanto, tiu ne necese estas pastoro. Lin nomumis la loka komunumo. Plejofte estas la pastoro, sed ne ĉiam. Tiu elekto de celebranto estas agnoskata (almenaŭ teorie) de la regionaj instancoj, sinodo kaj konsilantaro.

Por la Sankta Manĝo, ni uzas normalan panon, foje en bulo, kiun oni ŝiras, plejofte jam distranĉitaj en pecoj. Ni uzas ruĝan vinon. Ĉiu trinkas el la pokalo. Pro higiena kaŭzo, povas okazi kelkaj cirkonstancoj kaj lokoj, ke oni uzas aron da pokaletoj.

Dum la ceremonio, oni legas kvar tekstojn: la prefacion, kiu estas laŭdpreĝo, ĝenerale tradicia teksto («Vere, estas inde kaj juste...»). Poste la homoj staras por kanti, foje iun specon de «Sanctus». La homoj restas starantaj ĝis la fino. Venas poste la legado de unu el la bibliaj tekstoj, kiuj rakontas la Vespermanĝon en la alta ĉambro. Tiu legado ne estas akompanata de iu ajn gesto. Poste venas la epiklezo, preĝo al la Spirito, kiu ne celas la elementojn, sed la komunumon, sur kiun oni petas la venon de la Spirito. Denove kanto. Poste, la homoj estas invititaj veni ĉirkaŭ la tablo en rondo. Tiam oni dispecigas unu pecon da pano kun liturgia parolo, kaj oni levas la pokalon same. La pano estas donita sur telero al la unua homo, kiu prenas kaj donas la teleron al la sekvan- ta, ktp. Povas esti tiam parolo de unu al la alia.

Poste venas la pokalo, kiu aŭ iras de mano al mano, aŭ estas disdonita de la celebranto(j), kiu(j) rondiras. Kiam ĉiu ricevis, la celebranto legas dankpreĝon, kaj sendas la homojn al sia sidloko.

Pluraj partoj ne trovis fiksaĵojn lokojn en la ordo: nome la informoj, la preĝo por la aliaj, la monkolokto. Plejofte la preĝo „Patro Nia” estas dirata kiel fino de la preĝo por la aliaj.

La lasta parto estas kaj vorto de sendo, kiu reprenas la temon de la prediko, kaj pri bendiro.

Finaj rimarkoj

Io, kio povas helpi kompreni la signifon de la reformita Diservo, estas la sinteno de la protestantoj rilate la almozon ĉe la pordo de la preĝejo. Kiam plejofte la katolikoj donacas al almuzulo enirante la preĝejon (ĉu por havi ian meriton?), la protestantoj donacas

elirante el la preĝejo, kiel signo de sia dediĉo responde al la sendo en la mondon.

Tiu ordo de Diservo varias, vi komprenis laŭ la loko, laŭ la tradicio de la komunumo, sed ankaŭ laŭ la tempoj. La liturgia kalendaro havas influon.

La plej celebrataj grandaj festotagoj estas por ni Pasko kaj Pentekosto. Tamen, por kelkaj protestantoj, ne ekzistas alia festotago ol la dimanĉo, la tago de la Sinjoro.

Kompreneble, ni ankaŭ Diservas la tagon de Palmoj, sed ne pli ol normala dimanĉo. Kaj, en Francio, la protestantoj vole, ne celebras la 15-an de aŭgusto, nek la unuan de novembro. Se ili povus iri labori, ili tion farus. La terkultivistoj tion faras.

Vi certe komprenis post tiu mia parolado, ke la francaj protestantoj, almenaŭ la reformitoj, havas diversajn ritojn, kun propra kompreno, logiko. Vi ankaŭ rimarkis, ke ili vivas oftege en komparo kun la katolikaj kutimoj. Mi povas diri ke mi aprezas vivi en lando, kie mia kredkomunumo ne estas plimulta, sed akceptata, kie oni ne demandas pri via kredo por akcepti vin aŭ ne. Mi ne ŝatus vivi en lando, kie mia kredo estus plimulta, kaj volus ĉion regi. La francaj protestantoj de la komenco defendas la francan laikismon, kiel veran spacon de libereco, ankaŭ por anonci la evangelion. Tial, ili kontraŭas la ĵusan leĝproponon kontraŭ sektoj. Sed tio kondukas nin for de la ordo de Diservo.

Mi dankas.

Philippe COUSSON



Homo ne estas multe pli ol besto

Dum longa tempo vivadis sur la tero nur plantoj kaj bestoj. Finfine Patrino Tero naskis ankoraŭ idon postvenintan. Li nomiĝis Hometo. Hometo posedis ion, kion malhavis la aliaj bestoj. Pluraj vortoj povas ĝin indiki: racio, prudento, intelekto, inteligenteco, kompreno, ktp.

Per tiu ĉi donaco li sciis, ke li vivas kaj kiel li devas kreante uzi siajn manojn. Oni povus imagi al si, ke li ĝojas pri la ricevitaj cerbo kaj manoj. Sed tute male! Hometo estis tro dorlotita poste naskito. Lin ne feliĉigis la bela vivo ĉirkaŭ li. Li enviis la birdojn, kiuj kapablas flugi tra la aero kaj muziki, kaj li enviis la fiŝojn, kiuj libere naĝas subakve. Li rifuzis akcepti, ke li ne sukcesas same rapide kiel leopardo, ke li ne estas same forta kiel elefanto kaj malpli bela aspektas ol pavo.

Sed Hometo ja ne povis ne uzi la donon de pensado kaj krome estis tre lerta. Sed antaŭ ĉio li kondutis pigre. Li sukcese pripensis maŝinetajn, kiuj fulmrapide povas fari la laboron. Li zumis tra la atmosfero, vojaĝis super kaj sub la akvo. Li posedis maŝinetajn, kiuj estas pli fortaj ol mil ĉevaloj, kaj li transiris la sonbarieron. Li surmetis vestojn kaj gemojn kaj sentis sin pave fiera. Li havis skatoletojn, kiuj vere produktas muzikon.

Kaj ekzistis paralela hometo, pli malgranda, ne tiom forta, iom pli mola. Pri ŝi Hometo ne tiom atentis, ĉar li opiniis, ke tiu hometo ne havas saman prudenton kiel li. Sed sendube li ŝatis ŝin kaj volonte dormis kun ŝi.

Post iom da tempo Hometo ekpensis,

ke li perfekte mastras ĉion ekzistantan. Ankaŭ eĉ Patrino Teron. Li forgesis, ke Patrino Tero donas al li por manĝi. Ke akvo ebligas al li vivi kaj ke freŝa aero kaj por li kaj por la aliaj bestoj estas nepre bezonata. Li opiniis, ke la bestoj kaj la plantoj kaj Patrino Tero urĝe bezonas lin. Sed tio, kompreneble, ne estis la vero! Tute ne, eĉ male. Ĉu ili ja ne estis vivintaj milionojn da jaroj sen Hometo?

En Hometo komencis iom post iom kreski eĉ antipatio kontraŭ kelkaj bestoj kaj plantoj. Li aŭdacis nomi ilin fiinsektoj, fiherboj kaj ĉasinda sovaĝaĵo. Al li malplaĉis ke ili ekzistas kaj li mortigis ilin. Ĉar li havis inteligentan kapon kaj lertajn manojn, li en tio sukcesis tre facile. Per ununura kugleto eĉ plej potenca elefanto tuj surteriĝis. Ankaŭ venenoj ege utilis! Kaj li pripensis bombon, per kiu li kapablus detru la tutan teron, se li tion dezirus. Jen grandioza ideo! La alia hometo foje diris, ke Patrino Tero tion ne aprobas, sed tiam li reagis plene indiferente. Nu, Patrino Tero permesis al sia karulo agi laŭplaĉe. „Libere faru kion vi volas kaj ekspluatu ĉiujn miajn trezorojn, forsegu ĉiujn arbojn kaj kaŭzu al mi eĉ doloron!” Ŝi havis multe da pacienco. La alia hometo tre deziris paroli kun li pri lia sinteno, sed Hometo rifuzis aŭskulti kaj ŝin kaj Patrino Teron.

Finfine tio ĉiam pli tedis Patrino Teron. Ke Hometo kuraĝis ŝiajn aliajn geidojn nomi fiaj kaj sovaĝaj, nu, li faru! Sed li estigis el ili tute aliajn bestetojn kaj plantetojn manipolante iliajn konstruĉelojn. Patrino Tero eĉ ne plu rekonsis ilin. Ĉu do neniam li estis konten-

ta? Ĉu tiuj bestoj kaj plantoj ne donis al li por manĝi kaj trinki? Ĉu tiuj fiinsektoj ne for-ordigis liajn defalaĵojn kaj tenis lian ĝardenon fekunda? Ĉu ne ĉiam regis paco en la grandaj arbaroj, kie plantoj kaj bestoj harmonie kunvivadis? Ĉu tiun pacon devu malhelpi tiom pedanta Ne-Hometo? Ĉu la fiŝoj dronu en la malpura maro? Ĉu la birdoj ne plu flugu pro oleomakuloj, fluantaj el liaj ŝipoj kaj pezigantaj iliajn flugilojn?

Patrino Tero tute ne komprenis! Li havas grandan cerbon, sed kial li ĝin ne uzas? Hometo tamen ne aliĝis kaj agadis laŭplaĉe. Li ĉiam pli incitetis kaj ĝenis la bestojn. Foje li formanĝis ilin, sed ofte ilin mortigis pro nura plezuro aŭ por surmeti ilian mantelon kaj fari pilkojn el iliaj dentoj. Li mistraktis Patrino Teron kaj forŝtelis ĉiujn ŝiajn trezorojn. La tero fariĝis unu senlima malpurejo, ĉar li ĉion senzorge ĵetis sur la teron aŭ en la akvon.

Tiam forte koleriĝis Patrino Tero. Ŝi elsputis ĉiujn venenojn. Ŝi tiom furiozitis, ke ekdegelis la polusaj glacimontoj. Ŝi ploris maldolĉajn larmojn, tiel ke estiĝis grandaj inundoj. Ŝi tute ne emis ripari la truegon, kiun Hometo kaŭzis en la ozona tavolo. Ŝi skuis pro kolero kaj sputis fajron. Ĉiuj bestoj kaj plantoj tremis kaj fibris. Eĉ Hometo iom ektimis. Li do kaŝe enterigis malpuraĵojn aŭ ĵetis ilin en la foran profundan maron.

Sed vidis tion Patrino Tero, kaj videble ŝi ĉiam pli koleriĝis.

Subite Hometo rimarkis, ke ĉio ne bone marŝas. La manĝaĵoj ne plu bongustis al li, la malpura aero tusigis lin kaj la akvo igis lin vomema. La alia hometo ade malpli afablis. Ĉar ŝi ne plu povis elteni ke ŝi neniel rajtas okupiĝi pri kio ajn; cetere, ŝi deziris helpi al Patrino Tero.

Finfine montriĝis, ke Hometo tamen estas besto intelekte ekpita. Kiom stultega li estis! Li ekkonsciiĝis pri sia ĉirkaŭaĵo kaj malkovris ke ĉio kundenendas kun ĉio. Li komencis reuzi objektojn jam uzitajn kaj malpli pigris. Li ĉesis aplikante venenojn en sia ĝardeno kaj lernis sarki. Li spertis kiom bonfaras laciĝo kaj endormiĝi ĉiele. Li ree aŭdis la kantadon de birdoj kaj la kvakadon de ranoj, kiam li haltigis la maŝinetajn. Li ne plu rapidis tien kaj ĉien kaj preferis resti hejme ĉe la alia hometo.

Je lia granda miro montriĝis ke ŝi afable societemas kaj kapablas prudente pensinterŝanĝi pri ĉiaj aferoj. Kaj, mirakle, ŝi efektive disponas pri intelekto! Ĉar li ne plu senĉese maŝinfaris novaĵojn, li havis tempon por rebeligi malnovajn aĵojn, tiumaniere produktante multe malpli da rubaĵoj. Ĉar li ne plu uzis venenojn, malgrandaj bestetoj manĝante for-ordigis liajn defalaĵojn kaj refekundigis la teron. Li rimarkis ke la raŭpoj, kiujn li antaŭ nelonge ankoraŭ mortŝprucigis, iĝas belegaj papilioj kaj ke la pano multe pli bone gustas.

Li ne plu buŝkapte spiris kaj li ĝojis ĉiutage naĝante inter la fokoj. La bombon, pri kiu li iam tiom fieris, li forgesis, kaj jam rapide verdaĵoj superkreskis ĝin. Kaj Patrino Tero povis montri, ke fiherboj havas belajn florojn kaj arome odoras. Li subite ekvidis etajn bestojn, kiuj okulfrape similas al li kaj la alia hometo; kun ili li povis ludi kaj paroli. La plantoj fariĝis fratinoj, kaj la bestoj fariĝis fratoj. Kaj pri ili zorgadis Hometo, la alia hometo kaj iliaj infanoj, kiel Tero mem patrinumis ilin.

Laŭ eldono de „Vrouw en milieugroep Goed-Aardig”, Heemskerk 1991, tradukis: Jacques TUINDER

Kiu ne konas
la rakonton pri
la blinda viro,
kiun ni renkontas
en la evangelio,
kaj kies okuloj
estas fermitaj kaj
vidas, jes vidas
nenion, nenion?

Sed, vidu, ĉar
jam li leviĝas
vidas kaj diras:
Mi vidas homojn
kiel arbojn
mi vidas ilin
venantaj irantaj:

fortikajn kverkojn
pendbranĉajn salikojn
vibrantajn tremolojn
pikilhavajn piceojn...
mortintajn betulojn,
donintajn sian vivon
por savi fungojn
boletojn kaj insektojn...

Dankon al Dio!
Homoj kiel arboj.



Desegnis kaj verkis: Wiel MEERTENS
Prilaboris: Jacques TUINDER

Li estis iu el la plej fervore priserĉataj malliberuloj en Ĉinio. Pastoro YUN, gvidanto de la «hejmaj kongregacioj» kun pli ol 50 milionoj da membroj, estis kondamnita al morto. Mirakle li tamen eliris el la malliberejo. Tio okazis antaŭ pli ol du jaroj. Nun li havas kuraĝon aperi.

Kondamnita al morto li kuŝis sur la planko de sia ĉelo, nekapabla ekstari. Kaŭze de trasuferita turmentado lia tuta korpo doloris. Ambaŭ liaj maleostoj estis frakasitaj. Pastoro YUN neniam plu kapablus piediri, kaj aliaj devis porti lin sur siaj ŝultroj.

Tiam Dio aperis al li en vizio kiel multfoje jam pli frue, kiam Li intencis diri al li ion tre gravan. Dio ordonis al li eliri el la malliberejo. Eliri? Li ja eĉ ne kapablis piediri. Eksteren? Li estas barita de kvar pordegoj riglitaj. Krome staras tie gardistoj armitaj. Li estas en speciala malliberejo, el kiu oni ne povus fuĝi.

Sed dum sia proksimume 40-jara vivo li jam lernis, ke kiam Dio ordonas, Lia servanto obeu. Pro tio li ekstaris, kaj en la sama momento liaj piedoj resaniĝis. Kiam li alproksimiĝis al la pordo, la pordo malfermiĝis. Tra aperturo en iliaj pordoj aliaj malliberuloj vidis lin irantan en la koridoro. Ili apenaŭ kredis siajn proprajn okulojn – kiel ili poste deklaris.

YUN iris al la granda, ŝlosita pordego, kaj tiu malfermiĝis de si mem. Neniu gardisto estis videbla, neniu malhelpis lin. Iu de la aliaj pastoroj, kiu vidis la tuton, pensis, ke certe YUN estos mortpa-

fita, kiam li alproksimiĝos al la pordego en la granda muro. La spacon antaŭ ĝi neniu kapablas trairi, sen, ke li estu vidata. Sed ankaŭ ĉi tiu kvara pordego malfermiĝis. Ekstere ĵus alvenis taksio, per kiu YUN povis forveturi. – Dum multe da monatoj disvastiĝis la famo pri la fuĝo de YUN. – La ĉefaro de la malliberejo ne kapablis doni informojn pri kien YUN malaperis (komparu kun Agoj 12:6-10).

Kiam la ĵurnalisto renkontis pastoron YUN en la oficejo de la Slava Misio (Slaviska Missionen) en la sveda urbo Solna, jam pasis pli ol du jaroj. Intertempe Dio jam faris multe da mirakloj en la vivo de YUN. Sen scio de la registaro de Ĉinio YUN sukcesis foriri el la lando, kaj unu jaron poste ankaŭ liaj edzino kaj infanoj povis tion fari.

Hodiaŭ YUN kune kun sia familio loĝas en sekreta loko eksterlande.

Manfred STENBERG,
laŭ artikolo aperinta en *Petrus*,
03-12-1999



Same brila kiel la vetero estis la monاتفino **ADORU – por kune kanti kaj mediti en teorio kaj praktiko.**

Pastoro **Adolf BURKHARDT** kaj pastro **Bernhard EICHKORN** estis la prelegantoj kaj gvidantoj de tiu iom speciala ekumenisma semajnfino. Pastro EICHKORN ja iniciatis la kulturajn semajnfinojn kristanajn en Ĉaŭdefono kaj estis bela revivigo de malnova ideo. Tute ne malnova, kontraŭe, tute nova estas la ekumena kant- kaj preĝlibro **ADORU**, eldonita de IKUE kaj KELI tiun ĉi jaron.

Sinjoroj BURKHARDT kaj EICHKORN kaptis la atenton de la partoprenantoj per siaj viglaj rakontoj pri la estiĝo de la libro en plurjara laboro, kiun ili kompilis kune kun pastro Albrecht KRONENBERGER, kiu ankaŭ prizorgis la gigantan teknikan taskon de la enkomputiligo. Ili kolektis kaj elektis kantojn – precipe religiajn, sed ne nur – el multaj kantolibroj ek de la fruaj jaroj ĝis hodiaŭ, kovrante 90 jarojn inter la baza 'Verda Kantlibreto' kaj la nova **ADORU**. Multaj kantoj estas nove tradukitaj, por eviti tedajn rimaĵojn. Aktiva kantado interplektiĝis agrable en la prelegojn kaj pruvis la belecon de la lingvo kaj muziko.

ADORU ne nur estas kant-, sed ankaŭ preĝlibro. Ĝi enhavas la liturgion kaj diservon de pluraj diversaj kristanaj eklezioj, inkluzive ekz. la LIMA-Liturgion, la Liturgion de la Horoj kaj Taizé-diservojn. Abundas legaĵoj el la biblio, diversaj preĝoj, kaj eĉ „Eta Florbukedo el aliaj Religioj” trovis spacon en tiu libro, kiu estas konsiderata ĉe Esperantistaj kristanoj la plej grava verko

depost la eldono de la Sankta Biblio en la jaro 1926.

La sabata programo, plena je spiritaj impresoj, kulminis en publika ekumena diservo en la kristkatolika preĝejo de La Chaux-de-Fonds, riĉigita per pluraj kantoj el **ADORU** kaj la „*Dimanĉa Koncerto*” de **Anjo Amika**.

Dimanĉon pastoro BURKHARDT deziris reviziti CDELI, kiun li jam konis de antaŭaj jaroj. Sinjoro Claude GACOND afable estis preta komplezi malgraŭ la mallonga antaŭaverto, kaj poste ankoraŭ gvidis la tutan grupon ekskurse al Tête-de-Ran por promenadeto, ege ĝuita de ĉiuj.

Al niaj gastprelegantoj pastoro Adolf BURKHARDT kaj pastro EICHKORN, al Anjo Amika kaj Claude GACOND, al d-ro Giorgio SILFER pro la preparlaboroj, mi kore dankas pro ilia klopodoj, kiuj helpis, ke tiu semajnfino iĝis evento.

Sonja BRUN, prezidantino de KCE
HEROLDO KOMUNIKAS n-ro 141

1-a Germana Ekumena Eklezia Tago

De 28.05.–01.06.2003 okazos en Berlino la 1-a Germana Ekumena Eklezia Tago („Ökumenischer Kirchentag”) kun pli ol 100.000 partoprenantoj.

Ĝia temo estos:

„Vi estu beno” („Ihr sollt ein Segen sein”), supozeble laŭ Gen 12,1 (esperanta Biblio: „... kaj vi estos beno”) kaj Zef 8,13 („...kaj vi fariĝos beno”).

Ni kristanaj esperantistoj denove povas proponi kontribuojn, kion ni faru jam en la venontaj monatoj.

Ni povas proponi informstandon por unu el kvar temaj sekcioj, ekzemple

INDEKSO POR LA JARO 2001

aktualaĵoj

Pri religieco aliflanke / ŚMIGIELSKI, Stanisław / 826 / p.15

La angla ĉu? Ne! / SCHMITZ, Harald / 827 / p. 41

KELI-prezidanto 'evidente' vojaĝos al Ukrainio private / TUINDER, Jacques / 827 / p. 44-45

„Serĉi unuecon – renkontiĝi en diverseco” kaj „Formi la mondon – agi en respondeco”, ekumenan diservon (kaj eventuale aldona katolikan meson), kaj pliajn programerojn, ekzemple ankaŭ prelegon.

Volonte mi kolektos ideojn. Certe indas denove inviti ĉefepiskopon Jakubinyi. Ni bezonos ankaŭ iun tekston, kiu rilatigas nian esperantan movadon al la temo „Vi estu beno”. Verŝajne Zamenhof proponus ĉi tie siajn vortojn „Ĝis la bela sonĝo de l' homaro / Por eterna ben' efektiviĝos” aŭ „La nepoj vin benos”.

Supozeble la slogano „Esperanto – beno por la mondo” („Esperanto – ein Segen für die Welt”) nuntempe aspektas tro memfide, ĉu?

Pliaj informoj pri la aranĝo troviĝas ĉe: <<http://www.kirchentag2003.de>>

Jen ankoraŭ ĝojiga informo pri la germana IKUE-sekcio: Ĝia membraro kreskis de 42 en 1999 tra 58 en 2000 al 69 en 2001, kion ni dankas ĉefe al nia diligenta landa peranto Johannes P. Moser.

Amike

Ulrich MATTHIAS

Esperanto en la interreto / VEIT, Jerald / 827 / p.46-47

Bulgario urĝe bezonas nian solidarecon! / TUINDER, Jacques / 829 / p. 90-91

diversaĵoj

Mallumo / BECKER, Annette ; BURKHARDT, Adolf / 827 / p. 30

Evolucio de specioj per elinterna manifestiĝo aŭ per ekstera aldonaĵo? / ZECCHIN, Armando; MANTAUT, L. / 827 / p. 31

Dummilita incidento / VEIT, Jerald / 827 / p. 48

Ĉion mi devas scii, mi lernis de la arkeo de Noa / HARLER, Edwin / 828 / p. 70

Kokcinelo / LAZIAN, Yenovk / 829 / p. 92

Peto el Kubo pri Arto por Dio / CUEVAS PÉREZ, Yoan Francisco / 830 / p. 120

Moderna fabelo / TUINDER, Jacques / 831 / p.132-133

historio

Pri Jan Amos Komenský / REHM, Britta / 829 / p. 92

kongreso

15-a Ekumena Esperanto-Kongreso / COUSSON, Philippe / 829 / p. 96

kristanismo

Ekumenismo vidata el Italio / LONG, Gianni ; LEON, Mike / 826 / p. 10-12

Difektita savoperado / DIETRICH, Paul ; KRÜGER, Siegfried / 826 / p. 12

Doktrino kaj Sinjormanĝo / ZECCHIN, Armando / 826 / p. 12
Kio estas ekumenismo? / ZECCHIN, Armando / 826 / p. 13
Katolika kroata preĝo / BELOŠEVIĆ, Marija; BURKHARDT, Adolf; MOCANU, Cristian / 826 / p. 17
Kristanoj en Chengdu / MU Binghua / 826 / p. 24
Mia vojaĝo al Ĉinio kun BTA / LUNDKVIST, Arne / 827 / p. 27-30
Tre bona iniciato / POSPIŠIL, Václav / 827 / p. 32-33
Ĉu ŝtono aŭ sukeraĵo en la nesto de ekumenismo? / ZECCHIN, Armando / 827 / p. 33
Reago / KÓBOR Lajos / 827 / p. 38
Ekumena ĉarto / 828 / p. 51-58
Nova Biblio por brazilanoj / VEIT, Jerald / 828 / p. 62
Ree pri la maĥinacioj ĉirkaŭ profesoro Den Heyer / BERVELING, Gerrit / 828 / p. 63
La vivo de la justa Simeono / KUZMENKO, Larisa / 829 / p. 85-86
La vizito de la patriarko / KUZMENKO, Larisa / 829 / p. 87-88
Ekumenismo ĉu nur okazo de agordiĝa unuiĝo aŭ ankaŭ apartiĝo de kristanoj? / ZECCHIN, Armando / 830 / p. 111-114
Eskatologia konferenco / POKORNÝ, Josef / 830 / p. 114
La muro ne baris Pastoron YUN / STENBERG, Manfred / 831 / p. 135
1-a Germana Ekumena Eklezia Tago / MATTHIAS, Ulrich / 831 / p. 136-137

movado

Per paca armilo en nova jarmilo / ENDERBY, Kep / 826 / p. 18-19
Internacia infanrenkonto en la kulturdomo... / BARBAY, Elisabeth / 826 / p. 20

La tria internacia fotokonkurso / 826 / p. 21
Novaj el Hilelista rondo / SPEKULJAK, Mato / 826 / p. 21
S-ino Wil van Ganswijk / VAN GAN-SWIJK, Wil / 826 / p. 22
Ekumena oktobra monاتفino / 827 / p. 33
Bonvenon en Kroation en julio 2001... / SPEKULJAK, Mato / 827 / p. 37-38
Manpleno da novaj elektronikaj libroj / LUN, Franko / 827 / p. 39
TEJO lanĉis retrevuon / 827 / p. 39
1161 adresoj en pasporta servo / 827 / p. 40-41
Raporto pri packultura TEJO-seminario / 827 / p. 42
Sekretaria jarraporto pri la jaro 2000 / VAN DIJK, Els / 827 / p. 42-44
Nova monata bulteno „Kristana espero” enhavas bibliajn tekstojn / VEIT, Jerald / 828 / p. 63
37,1% studus Esperanton! / GRIGORJEVSKIJ, Andrej / 828 / p. 64
Esperanto-aranĝoj en Ĉervar-Porat... / SPEKULJAK, Mato / 828 / p. 65-66
Nova muzika kompaktdisko / 828 / p. 67
Konkurso pri Esperanto en radio / 828 / p. 67
Esperantista projekto en neesperantista simpozio / PETROVIĆ, Radojica / 828 / p. 68
BET / 828 / p. 68
Grava revuo eliras el la krizo / TONKIN, Humphrey / 830 / p. 115
Jardeko por kulturo de paco / CORSETTI, Renato / 830 / p. 115
Internacia fotokonkurso / 830 / p. 116
Greziĵono serĉas voluntulojn / 830 / p. 116
Datoj por via kalendaro kaj diver-

saj informoj / BURKHARDT, Adolf / 830 / p. 117-118
Himnoj en la reto / MILLER, Lee / 830 / p. 118
El Kongia Demokratia Respubliko / MATONDO, Leonardo / 830 / p. 119
Plensukcesa oktobra monاتفino en KCE / BRUN, Sonja / 831 / p. 136

nekrologo

Nekrologo: Amy Nilsson / LUNDKVIST, Arne / 826 / p. 23
Nekrologoj [Andersson, Bergvall] / LUNDKVIST, Arne / 828 / p. 71
Nekrologo [Horský] / POLNICKÝ, Pavel; BURKHARDT, Adolf / 829 / p. 95
Forpasis la sinjoro de la svisa poŝtmarko / 831 / p. 143

poezlo

Por via festo / BURKHARDT, Adolf; BURKHARDT, Grete / 826 / p. 22
La tempo estas proksima / RETZLAFF, Manfred / 828 / p. 72
Printemp-vekiĝo / KNAPP, Alfred; RETZLAFF, Manfred / 828 / p. 72
Ridetu!!! / BARANOWSKI, Czesław / 829 / p. 89
Demandaro ĉe la sojlo de la nova jarcento / BARANOWSKI, Czesław / 829 / p. 91
La decida horo / ŌSHÓ-DAVIES, Olúbùnmi Gabriel / 830 / p. 118
Homoj kiel arboj / MEERTENS, Wiel; TUINDER, Jacques / 831 / p. 134
Kio gravas / ŌSHÓ-DAVIES, Olúbùnmi Gabriel / 831 / p. 144

recenzo

Nova studo de Claude Piron / 827 / p. 34
La ĉefverko de Gogol en la serio "Oriento-Okcidento" / GORECKA, Halina / 827 / p. 34

La reĝo, la saĝulo kaj la burleskulo / TUINDER, Jacques / 827 / p. 35-36
Kontakto pri lingvoĵaro / 827 / p. 40
Nova traduko de William Auld / 828 / p. 58
Trans la spegulo / GORECKA, Halina / 828 / p. 58
Enkonduko al la nova kant- kaj Diserv-libro Adoru / TUINDER, Jacques / 828 / p. 59-60
Adoru / 828 / p. 60-61
Laste aperis... / 828 / p. 66
Nova traduko de William Auld / 829 / p. 89
Trans la spegulo / GORECKA, Halina / 829 / p. 89

teologlo

Religio – tute ne konata afero / SCHAT, Dieter; KRÜGER, Siegfried / 826 / p. 14
La pekkonfesa preĝo de Jean Calvin / MAKAY Attila / 826 / p. 16
Protestantismo kaj fasto / CLÉMENT, Michel / 826 / p. 3-5
Nabal, la stultulo / BUDDEN, David / 826 / p. 6
Transdonita destino / ŌSHÓ-DAVIES, Olúbùnmi Gabriel / 826 / p. 7-8
Redonu do al Cezaro... / KRÜGER, Siegfried / 826 / p. 8
La infero, miskomprenita loko / HARLER, Edwin / 826 / p. 9-10
Naskiĝis komunumo de bonvolaj homoj / FARKAS-TÁTAR, Éva / 828 / p. 61-62
Al la Romanoj 1 / BERVELING, Gerrit / 828 / p. 69-70
Al la Romanoj 2-8 / BERVELING, Gerrit / 829 / p. 75-84
Pri kosma konscio / POKORNÝ, Josef / 829 / p. 93
Pri kio instruas nin nia Sinjoro? La

Kotizoj de KELI 2002

Individua membro (kun Dia Regno)	20,00 EUR
Familia membro (sen DR)	2,00 EUR
Subtenanta membro (kun DR)	30,00 EUR
Dumviva membro (20-obla jarkotizo)	400,00 EUR
Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI	16,00 EUR
per libroservo	18,00 EUR
KELI-anoj rajtas aboni „Espero Katolika” pere de la KELI-kasisto	12,50 EUR
IKUE-anoj rajtas aboni „Dia Regno” pere de C.O. de IKUE	10,00 EUR
Aerpoŝta sendado al ekstereŭropaj landoj (unuopaj ekz.)	3,00 EUR
Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj la ricevon de DR; donacoj estas bonvenaj)	Donaco

Pagmanleroj:

- Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube),
- Poŝtĝire al Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam por KELI-konto **kelk-p** en Belgio: 000-1631831-97
 - Germanio, Köln: 3182 91-509, BLZ 370 100 50
 - Nederlando: 378964 (el ekster NL aldonu pro bankkostoj 3,50 EUR)
 - Svedio: 74374-0
 - Svislando (Bulle): 12-2310-0
- Poŝtĝire al la KELI-konto
 - Nederlando 5506132 (el ekster NL aldonu pro bankkostoj 3,50 EUR)
- Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: **kelk-p**
- Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto,
- Per okcidentaj monbiletoj, senditaj al la KELI-kasisto.

<i>sankta patriarko Aleksio la unua pri la fido</i> / KUZMENKO, Larisa / 829 / p. 94	<i>Al Timoteo 1</i> / BERVELING, Gerrit / 831 / p.123-127
<i>Al la Romanoj 9-16</i> / BERVELING, Gerrit / 830 / p. 99-108	<i>Tento</i> / BUDDEN, David / 861 / p.127-128
<i>Ĉu spiritlegajemuloj aŭ bagatelig-ĉasemuloj</i> / ZECCHIN, Armando / 830 / p. 109-110	<i>La Reformita ordo de Diservo en Francio</i> / COUSSON, Philippe / 831 / p.129-131
<i>Mi estas ŝafo en ŝafaro (monologo)</i> / CUEVAS PÉREZ, Yoan Francisco / 830 / p. 120	<i>Ĉe l' Sinjora flanko ne eblas manko</i> / ŌSHŌ-DAVIES, Olúbùnmi Gabriel / 831 / p.144

Landaj kotizoj en 2002

Belaruslo (vidu ĉe Ruslo)	*)
Britio	15 GBP
Nacia ĝirokonto n-ro 65 274 0006 nome de Fellowship of British Christians Esperantists (FBCE). Kasisto: Tom NEIL, 37 Soutar Crescent, Perth, Skotlando, PH1 1QB Tel.: 01 738 623 699	
Bulgaro	*)
Peranto: Ĥristo DIMITROV, str. Stracin 16, BG 7300 Kubrat	
Ĉeĥa Respubliko (Inkl. Slovaka Respubliko)	160 CZK
Peranto: Pavel POLNICKÝ, Lesní 150/VI CZ 29001 Poděbrady, tel.: 0324(61)5651	
Estonio	*)
Peranto: Endel OJASILD, PK. 24, EE 10502 Tallin	
Finnlando	30 EUR
Poŝta konto n-ro 800027-4306 454 nome de Suomen Kristallinen Esperantoliitto. Kasistino: Soili SALMINEN Kivikatu 8 C 51, FI 15700 Lahti, tel.: 03-781 7637	
Francio	24,87 EUR
CCP n-ro 10456 15 U Paris, nome de Franca Evangelia Esperanto-Ligo (FEEL). Kasisto: Philippe COUSSON 26 Rue de Pré Ventenet, FR-86340 Nouaillé-Maupertuis tel.: 05 49 468021	
Germanio	24 EUR
Poŝtĝirkonto Hamburg n-ro 109204-206, BLZ 20010020 nome de Sonderkonto Esperanto. Kasistino: Astrid HANKE Am Friedrichshain 37, 25980 Westerland/Sylt tel.: 04651 5510, fakso: 04651 21963	
Hungario	*)
Peranto: Irén BAGI, Baross u. 54/B.II.8, HU-1201 Budapest tel.: 01 283 6566	
Japanio	20 EUR
Peranto: Seiziro KAWAMURA, Rex Kiyomizo-gojo 702, yamadacho 501, Higashijama-ku-Kyoto 605	
Kazaĥstano (vidu ĉe Ruslo)	*)
Korea Respubliko	20 EUR
Peranto: D-ro Puramo CHONG, Kwangmyong-Shi Kwangmyong 2 dong 50-5, Kyongki-Do, Sud-Koreio 423-012	

- Latvio** *)
Peranto: Valdis GULBIS, Lielá iela 1 dz. 2,
Valdemārpils Talsu raj, LV-3260
- Litovio** *)
Peranto: Erikas LAICONAS, p/k 165, LT-3000 Kaunas, tel.: 370 7 222131
- Nederlando** 24,54 NLG
Poŝtbankkonto n-ro 108 75 75 nome de KUNE,
Kasistino: Gerda DERCKS, Ootmarsumsestr. 47, NL-7607 AX Almelo
tel.: 0546 819 403, fakso: 0546 819 403
- Pollando** 30 PLZ
Peranto: Kazimierz LEJA, poŝtfolio 59, PL-41-250 Czeladź
tel.: (32) 763 37 13; 0609 771537
- Rumanio** *)
Peranto: Maria LÁSZLÓ, C.P.202, RU-4800 Baia Mare
tel.: 062 426182
- Rusio (Inkl. Belarusio, Kazahŝtano kaj Ukrainio)** *)
Peranto: Larisa KUZMENKO, Kuŝvinskaja 25 A, RU 622013 N. Tagil,
Sverdlovskaja Obl. Rusio
- Slovaka Respubliko (vidu ĉe Ĉeĥa Respubliko)** *)
Svedio 200 SEK
Poŝtĝirkonto n-ro 9 14 39-0 nome de Kristliga Esperantoforbund.
Kasisto: Arne LUNDKVIST, Kyrkogatan 28, SE-33131 Värnamo
tel.: 0370-13908
- Svislando** 20 EUR
Pagu al la svislanda UEA-konto (vidu supre)
- Ukrajnio (vidu ĉe Rusio)** *)
- Usono** 20 EUR
Peranto: Jerald T. VEIT, 3578 S. Raylor, Milwaukee, WI 53207

*) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto.

Nun pri la kotizaltigo. En Zagrebo ni konfirmis la decidon el 2000 altigi al €20, malgraŭ kelkaj taksis tion tro. Sed ni ja ne nur volas eldoni nian organon, sed ankaŭ subteni malfortajn kongresanojn, eldoni librojn kiel *ADORU* kaj nun novelton la *Biblion*, kiu preskaŭ estas elĉerpita.

Sed neniu forlasu KELI pro la kotizaltigo. Se iu estas vere finance malforta, tiu kontaktu la landan reprezentanton aŭ la kasiston de KELI.

Siegfried KRÜGER

Vortserĉludo

O	T	N	A	K	I	D	E	R	P
B	U	R	M	E	N	F	A	K	S
E	C	Ŝ	A	C	O	J	I	G	A
H	I	D	L	U	M	J	H	O	L
J	O	S	A	E	O	E	G	Ĉ	M
A	Z	T	Ĥ	D	F	S	O	M	A
Ĉ	E	E	I	S	K	A	Z	O	R
U	N	V	R	E	P	J	R	D	O
R	E	L	I	R	O	A	T	Z	B
L	G	A	Ĝ	M	E	V	O	T	E

En tiu vortserĉludo estas kaŝitaj 10 libroj de la Malnova Testamento. La vortoj troviĝas horizontale, vertikale aŭ ankaŭ diagonale en la diagramo. Ili povas parte koincidi aŭ esti skribitaj returne.

Fritz LAUTENBACH

Solvo de la krucvortnigmo (830)

horizontale: 1. herezulo, 7. al, 8. non', 9. sunege, 11. unuo, 13. sel', 14. car', 15. ikti, 16. infero, 18. ame, 19. ek, 20. oksigeno.

vertikale: 1. halucino, 2. el, 3. enuo, 4. zon', 5. Unesko, 6. obelisko, 9. surfas, 10. get', 12. nan', 15. ireg', 17. emi, 19. en.

kromsolvo: Genezo.



LASTMOMENTE...

Pasintan semajnon mortis sinjoro Henk DE HOOG el Castricum. Li estis la verkinto de „Nia Historio”. Dum pluraj jaroj li estis prezidanto de KELI. Li estis eminenta lingvisto kaj Esperantisto. Venontnumere aperos nekrologo.

Els VAN DIJK

NEKROLOGO

FORPASIS LA SINJORO DE LA SVISA POŝTMARKO

Post la dua mondmilito filatelio registris novaĵojn pri nia lingvo nur en orienteŭropaj landoj: Bulgario, Hungario, Pollando... „Nur ĉe komunistoj!” rimarkis okcidentanoj de tempo al tempo. Sed en 1979 neŭtrala lando rompita la regulon: poŝtmarko dediĉita al Esperanto aperis en Svislando.

La sukceson ni ŝuldas al s-ro Fritz LIECHTI, zurikano, kiu havis brilajn ideojn ne nur filatelie. Ekzemple li konvinkis amikon konstrui mon-golfjeron kun la vorto ESPERANTO kaj la kvinpinta verda stelo. Ĝuste tiu balono aperas en la poŝtmarko (70-centima, por ordinara afranko), kun la skribo: „*Universala Kongreso de Esperanto, Lucerno 1979*”. La poŝtmarko estas ankoraŭ mendebla ĉe KCE.

Fritz LIECHTI estis fervora kaj honesta aktivulo, membro de Svisa E-Societo kaj apoganto de Kultura Centro Esperantista, al kiu li testamentis legaĉon.

Heroldo Komunikas n-ro 140

Fritz estis ankaŭ membro de KELI, kaj li multe partoprenis en la organizado de la KELI-kongreso en Bienenberg, Svislando, 1979. Ni kondolencas al la familianoj kaj al la amikoj.

Kara kunhomo,

Eble iam ĉi-monde ni nin renkontos,
Kaj do pri ni reciproke rakontos;
Sed bonvolu tiam ne diri al mi
(Alie mi ne ja aŭskultus al vi)
Kia la religio via estas.

Ke vi kunhom' estas, nur tio gravas!
Mi eltrovis ke religi' ne savas;
Se al tio mankas la virto amo:
Al nov-naskintino se mankus mamom,
Kiom forta estus ties bebo?

Ne gravas al mi via religio,
Ĉar en tio ne ja troviĝas Dio:
Per amo Li vestiĝas, vivas en ĝi,
Vidi, tuŝi Dion se plaĉus al vi,
Vi jam devas ami viajn kunhomojn.

Renkontante min, amon montru,
Nur tiel la religion vi demonstru;
Mi do ne de vi bezonas ekpeti
Kian vian devenon por povi meti
Miajn sekretojn en viajn orelojn.

Ĉu mi ofendas vin? Bonvolu pardoni.

Olúbùnmi Gabriel ÒSHÓ-DAVIES
(13/07/1999)



ĈE L'SINJORA FLANKO NE EBLAS MANKO

En la 23-a kaj 24-a Psalmoj, David rakontas pri l' valoro resti ĉe Dio. En la 23-a li sciigas, ke farante el Dio sian paŝtiston, oni ne havas mankon. Ne estas malfacile kompreni tion ĉar en Psal-

KIAM LA VERON ONI TORDAS,
TIAM LA KONSCIENCO MORDAS.



mo 24:1, li diras ke la tero kaj ĉio kio plenigas ĝin apartenas al Dio. La Eternulo tion konfirmas: „Se vi estas humilaj kaj obeemaj, vi manĝos la bonaĵon de la tero” (Jesaja 1:19). Kiel obei? — Resti ĉe Li. Kiel esti humila? — Respon-di Lian alvokon: „Venu kaj ni faru inter ni juĝan disputon” (Jesaja 1:18).

Jesuo ankaŭ kontribuas, „se vi restadas en mi kaj miaj vortoj en vi, petu kion ajn vi volos, kaj tio estos farita por vi” (Johano 15:7). Oni obeas restante en Kristo. Oni estas humila permesante Liajn vortojn restadi en si. Malrespekto al la vortoj signifas fierecon aŭ sendependecon.

Ni restadi ĉe la Sinjora flanko, por ke nin ne trafu manko.

Olúbùnmi Gabriel ÒSHÓ-DAVIES